



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBahn

Numero 1 · Januaro/Februaro 1958

Ĉu ni estas kontentaj?

Ĉu vi ankoraŭ memoras la Bultenon n-ro 1/57, ĉu ankoraŭ la artikoleton, surskribitan per la vortoj „Kaj nun?“ Se iel eble, relegu ĝin nun, antaŭ ol vi daŭrigos legi miajn hodiaŭajn liniojn. — Kaj se vi nun estas releginta la tiamajn vortojn, vi jam scias la respondon je la ĉi-supra demando. Ne, ni ne estas kontentaj. Ne kredu, ke mi estas pesimisto, sed persono aŭ organizaĵo deziranta atingi definitivan celon, nepre de tempo al tempo turniĝu, rigardu la iritan vojon kaj serĉu antaŭ si, kie troviĝas la eblecoj antaŭen marŝi, penetri tra la densejo de obstakloj kaj obstinaĵoj. Kion ni faris aŭ almenaŭ komencis fari el tio, kion mi menciis antaŭ unu jaro? Ni unue esploris nian organizaĵon kaj zorgis pri tio, ke, post kiam nova estraro estis preninta la bridojn, nun ankaŭ granda nombro da subsekcioj ekfunkciis. Kvankam ĝis nun ne estis eble, trovi kontentigan solvon en ĉiuj distriktoj, oni tamen povas diri, ke ĉi-rilate ni jam multon atingis en la pasinta jaro. Kaj estas nun almenaŭ diversaj distriktoj, en kiuj laboremaj subsekcioj penadas komune kun spertaj kolegoj, gvidi la aferon per iurtaĵoj. Bedaŭrinde ekzistas aliaj distriktoj, kies samideanaj kolegoj ŝajne dolĉe kaj ĉiame estas dormantaj.

Ni samtempe klopodis, reguli la distribuon de la Bultenoj sur nova bazo. Mi esperas, ke nun tiuj membroj, kiuj pagis la kotizon, regule ricevas ambaŭ, la IFEF-kaj la GEFA-Bultenojn. Se ankoraŭ estas breĉoj, oni nepre sciigu tion al la sekretario.

Sed ni faris alian, novan. Sciante, ke nura, senviva organizaĵo taŭgas al nenio, la unuan fojon ni kunvokis la anojn de GEFA al komuna kunveno. Ĝi okazis en Fulda, kaj la opinio de ĉiuj ĉeestintoj estas: Venontan jaron denove! Venontan jaron pli multnombro al Nürnberg! Venontan jaron manku eĉ ne unu distrikto! En Fulda vi aŭdis pri tio, al kio ni strebadas. Vi eksciis, ke jam diversaj sukcesoj estas videblaj, sed ke ankaŭ longa, longa programo atendas nin, plenumenda en la nestaj jaroj. Apartaj taskoj staras antaŭ ni en somero 1958, kiam la Universala Kongreso de UEA okazos en Mainz. Sendube certa parto de tiu programo estos efektiva de la estraro. Tamen restos amaso da problemoj, kiujn nur povos realigi la subsekcioj kune kun siaj nelacaj grupestroj kaj membroj.

Same kiel lastjare ankaŭ nuntempe estas gravege, varbi novajn membrojn, precipe tiajn, kiuj fakte deziras uzi nian lingvon. Estis ĝojige, ke en Fulda granda parto de la partoprenantoj regis kaj utiligis la Internacian Lingvon, kvankam nur ĉeestis samlandanoj, ja ke estis aŭdebla la deziro, venontjare pli vaste uzi Esperanton dum

nia kunveno. La uzo de nia lingvo estas la plej efika propagandilo por ni. La dubuloj kaj kritikemuloj ja devas konvinkiĝi, kiam ili aŭdas nin paroli, diskuti, babili, kanti. Ni do havas du fiksaĵn, daŭrajn celojn: varbi membrojn kaj lingve eduki ilin. Sed ni nur sukcesos, se ni unuavice klopodadas, en plej ekzakta maniero plenumi niajn profesiajn taskojn. Ni nepre unue estu bonaj fervojistoj kaj krome fariĝu bonaj esperantistoj! Niaj kolegoj kaj superuloj neesperantistaj nur agnoskos nin kaj niajn ideojn, se ni ne donos al ili kaŭzon diri: „Rigardu, lia kapo pensas pri kuriozaĵoj, sed ne pri profesio.“

Kaj nun antaŭen al la tri manifestacioj ĉi-jaraj: al la 10a Jubilea IFEF-Kongreso Aarhus en majo, al la 43a Universala Kongreso de Esperanto Mainz en aŭgusto kaj al la 2a Kunveno de Germanaj Fervojistoj Esperantistaj Nürnberg en oktobro. Mia deziro kaj nia devizo por 1958 estu, ke la flugilrado portu la verdan stelon al multaj fervojistoj!

Prezidanto

En eksprestrajno 60 m super la maro

Sicilio ne plu insulo

Per kostoj de 240 milionoj da germ. markoj kaj per okupo de 12 000 laboristoj la markolo de Mesino estas transportota en la daŭro de 6 jaroj. Poste Sicilio ne plu estos insulo. La itala registaro devas ankoraŭ nur kontrakti, se ĝi volas vidi efektivigota ĉi-tiun kuraĝan planon, kiun amerika mondfirmao prezentis al ĝi.

Dum longa tempo ŝajnis, ke oni volis doni la antaŭrangon al submara tunelo al Sicilio, ĉar la markolo de Sicilio estas konata pro la malbonfamaj ekventegoj. Sed oni ankaŭ pripensis la danĝeran proksimecon de la Etno, la tre maltrankvilan terkruston, en kiu ofte tondras tertremoj, kaj la fortan marfluegon en la parte ĝis 400 m profunda markolo. Tial esploristaro, komisiita de la itala registaro, pledis nun por la konstruado de ponto. Sicilio kun sia riĉeco je fruktoj, vino, greno, fiŝoj, sulfuro, gipso, petrolo kaj asfalto jam de longe atendas firman interligilon kun la devenlando. Nuntempe ĉ. 40 000 ŝipoj jarmeznombro transveturas la markolon de Mesino. La nova ponto, havanta neniuajn trafiklimigojn, ebligos sur la pontstrato la transporton de 360 000 veturiloj, krome sur la ponta trako tian de 600 000 trajnveturiloj. La ekonomia profito estos giganta. La transporto de aŭtomobiloj kaj ŝarĝveturiloj sur la akvovojo kostas hodiaŭ ĉ. 24 000 lirojn po veturilo. Estonte ĉi-tiu sumo malaltiĝos al 6000 ĝis 7000 liroj. Kiam la sicilia ponto estos realaĵo, ĝi estos la plej longa de la mondo, pli longa ol la fama Golden-Gate-Ponto en San Francisko, pli longa ankaŭ ol la projektita Öresund-Ponto inter Seelando kaj Falster. Dr. Steinmann, la kreinto de la Golden-Gate-Ponto, kiu ellaboris ankaŭ la projekton por la sicilia ponto, volas ĝin konstrui tute el ŝtalo. Konsidere al la ŝiptrafiko ĝia alteco fariĝos 60 m.

La trafiko cirkulados en du etaĝoj. En la supra etaĝo estas 27 m larĝa aŭtomobilstrato, havanta 6 vojojn apartigitajn inter si per herbostrioj. La malsupra etaĝo estas destinita por fervojo durepara. La ponto ekzistas el tri arkoj. La enverguro de la centra arko estas 1524 m, longeco, kiun je neniu alia ponto sur la terглоbo oni riskis. La du ŝtalapogiloj havas altecon de 220 m super la maro. Ĝiaj piedestaloj betonaj fundas ĝis 120 m sub la marnivelo. Por ke la ponto kontraŭstaru ankaŭ al tertremoj, en la skizo estas planita interfirmiga apogfosto, kiu je la punktoj de la plej grandaj fortoj havas la plej grandan altecon. Krome la dratkabloj per dratŝnuregoj estos ligitaj kun la firma soklo de la piedestaloj. Tial la ŝanceligoj — kaŭzitaj de ŝtormo kaj transkuliĝantaj trajnoj — estos malpliigataj. Konstruante la kolosajn kolonojn, transverse 26 × 61 m grandaj, oni volas subakvigi ŝtalcilindrojn inter naĝantaj trabaroj ĝisroken. Tiel gigantaj kiel aspektas la dimensioj de la konstruplano, estos ankaŭ la sumoj por la bezono de materialoj. La pontkonstruaĵo englutos 450 000 cbm da betono, 50 000 t da dratkabloj kaj 80 000 t da konstruŝtalo.

Trad. el „Der Eisenbahnfachmann“ Fr. Busse

Neniu forgesas ke kotizo necesas

IFEF-kongreso en Aarhus

Sian aliĝilon ricevis ĉiu IFEF-ano kun la lasta IFEF-bulteno Nr. 1/2. Ĝi enhavas ankaŭ ĉion sciindan. La aliĝmanieron ni regulas jene: Ĉiu partoprenonto bonvolu sendi la aliĝilon plej malfrue ĝis la 15a de marto per dejora poŝto al la GEFA-ĉefkasisto kol. BA Otto Denk, Prüfungsamt BD Frankfurt/M. Samtempe bv. ĝiri la finkalkulitan sumon plus 2,— GM por elspezoj (3,— GM por

nemembroj de GEFA) al la konto 40 372, Eisenbahn-Spar- und Darlehnskasse, Frankfurt/M. favore al IFEF-kongreso. Kalkulu 1 dan. krono = 0,62 GM. Ni petas, ke ĉiu partoprenonto krom tio informu sian subsekcistron. Aliĝiloj sen samtempa pago ne validas. Ne aliĝu rekte al la LK K. Izoluloj skribu rekte al la GEFA-ĉefkasisto.

Listo de estraro kaj subsekcistoj de GEFA

distrikto	nomo, antaŭnomo	titolo	a) dejora adreso	telefono	b) privata adreso
Prezidanto	Giessner, Joachim	BOI	Bf Braunschweig Hbf	9 49 / 8 66 / 3 40	Braunschweig, Hauptbahnhof 6
Sekretariino	Kruse, Elfriede	BS	Sozialamt Ffm	22 04	Frankfurt (M), Ackermannstr. 82
Varbado Kasisto	Barnickel, Wilhelm Denk, Otto	BI BA	Tarifamt Ffm Prüfungsamt der BD Frankfurt (M)	56 01	
Terminaro	Ritterspach, Gernot	BI	Bf Heidelberg Hbf	15 20 2 32	Bammental b. Heidelberg, Oberdorfstr.
Redaktoro Konsilanto	Steinig, Paul Dr. Lang, Wilhelm	tBOI BA	AW Bremen Prüfungsamt der BD Frankfurt (M)	8 35 / 3 48	
Augsburg	Einsle, Hermann	BOI	Ozl Augsburg	15 10	
Essen	Schnetzer, Alfred	BA	OBL West, Essen	4 72	
Frankfurt (M)	Dr. Lang, Wilhelm	BA	Prüfungsamt der BD Frankfurt (M)	20 35	
Hamburg	Hartjen, Fritz	Ozf	Bf Hamburg-Altona	15 10	
Hannover	Giessner, Joachim	BOI	Bf Braunschweig Hbf	9 49 / 8 66 / 3 40	Braunschweig, Hauptbahnhof 6
Karlsruhe	Winkelhaus, Otto-Hch	BOR	AW Schwetzingen	8 91 / 3 54	
Kassel	Keil, Paul	BOI	BD Kassel, Büro P	12 70	
Köln	Westfeling, Adolf	BOI	Bp-Köln	52 36	
Mainz	Eisenbarth, August	tBOI	AW Kaiserslautern	8 06 / 5 10	
München	Berger, Hans momenta anstataŭanto: Behr	BOI BOS	BD München, Büro P München, Bundesbahnschule	51 58 75 63	
Münster	Brandenburg, Willi	tBI	Bm Münster 3	13 52	Münster, Wilhelmstr. 38
Nürnberg	Zintl, Robert	BOI	BD Nürnberg, BI	18 91	
Regensburg	Parsch, Hans	BR	BD Regensburg, Dez 4H	4 04	
Saarbrücken	Höh, Oskar (komisiita)	AssAnw	GA Homburg (Saar) Hbf	8 02 / 2 04	
Stuttgart	Kiebele, Anton	BS	VK II Stuttgart	9 52 / 57 43	
Trier	Klaes, Anton	BI	BD Trier, Büro Lg	54 12	
Wuppertal	Dawid, Alfred	Vorlack	AW Opladen		

Niaj subsekcistoj raportas . . .

Bremen. Kvankam la kondiĉoj, lerni Esperanton, estas tre favoraj, estas malfacile, trovi novajn adeptojn. La grupesperoj okazas ĉiun merkredon en la „Princa ĉambro“ de la ĉefstacidomo kune kun la loka grupo. Vizitis nian kongreson en Rijeka 2 membroj, kiuj ambaŭ unuope vizitis Jugoslavion kaj Greklandon, kie ili kontaktis kun tieaj fervojistoj esperantistaj. Ni sukcesis gajni 2 knabinojn por nia afero. Ili estas tre entuziasmaj, verbas diligente en siaj lernejoj kaj havas post unujara lernado de Esperanto jam mondvastan korespondadon kun eksterlandanoj. Tamen ni kredas, ke progresos venontjare Esperanto ankaŭ ĉe ni.

Steinig

Essen. Nia kolego Waldmann (Recklinghausen) plej bone plenumis la taskojn de la subsekcistaro en la BSW direkto Essen ek de junio 1953. Pro sia malsano kaj pro sia venonta emeritiĝo li jam de longe petis malsarĝi lin. Ek de majo 1957 kolego Schnetzer, OBL West Essen (telefono 12 31 aŭ 20 35), iĝis nova subsekcistaro; kolego Waldmann restas lia anstataŭanto kaj prizorgos ankoraŭ kelkajn aferojn, i. a. la distribuon de la bultenoj, la enkasigon de la kotizoj k.t.p.

La unua kunveno de la Fervojistaj Esperantistoj en la direkcia regiono Essen 1957 okazis la 29an de junio. Estis traktitaj la organizo de la subsekcio kaj de la lokaj grupoj, la varbado

por Esperanto, la aranĝo de kursoj por komencantoj, la kunvenoj de progresintoj kaj aliaj gravaj komunaj aferoj. Krome nia kolego Bartz (Dortmund), kiu partoprenis la 9an IFEF-kongreson en Rijeka kiel delegito de la subsekcio Essen, faris esperantlingvan prelegon pri sia vojaĝo al Rijeka.

En la dua kunveno de la subsekcio Essen je la 14a de septembro la partoprenintoj traktis kaj preparis la programon por la fakkunsidoj okaze de la Revelo-tago en Witten (Ruhr).

En la kadro de la Revelo-tago (Rejnlanda-vestfalia Esperanto-Ligo) en Witten (Ruhr) je la 28a kaj 29a de septembro okazis renkonto de la Fervojistaj Esperantistoj de Nordrhein-Westfalen kaj estis fakkunsidoj. Partoprenis kolegoj el 16 lokoj de la direkciaj regionoj Essen Hannover, Köln, Münster kaj Wuppertal; krome ĉeestis kelkaj edzinoj de niaj kolegoj kaj iu-tempe kelkaj ne-fervojistaj esperantistoj kiel gastoj.

La 28an de septembro posttagmeze en la aŭlo de la Schiller-lernejo kolego Brandenburg (Emden) faris tre interesan lumbild-prelegon pri sia vojaĝo al la 9a IFEF-kongreso en Rijeka kaj pri sia veturado tra Italio; ĉi-tiun prelegon partoprenis ankaŭ multaj ne-fervojistaj geesperantistoj. Vespere estis gaja kunveno en hotelo Dünnebacke kun prezentaĵoj de s-ano Starke (Erlangen): „Rido de la mondo.“

La 29an de septembro matene estis aranĝita katolika diservo en la kapelo de Marien-malsanulejo kun esperantlingva prediko de rev. pastro Beckers (Kwaadmechelen/Belgujo).

Post komuna kunsido de Revelo en Parkhaus Hohenstein ni traktis organizajn taskojn de la unuigo de la Fervojistaj Esperantistoj en la direkcia regiono Essen.

Posttagmeze nia kolego Ladage (Wanne-Eickel) faris lumbildprelegon pri vojaĝo en Hispanio kaj ni aŭskultis kelkajn prelegojn, i. a. pri „La ekzistadbatalo de la fervojoj kontraŭ la strattrafiko“ verkita de nia kolego Klerks (Bottrop), kaj prelegon de nia kolego Hermanns (Duisburg-Wedau) pri „Fervojista vojaĝo al SAT-kongreso en Rotterdam de la 3a ĝis 10a de aŭgusto 1957“. Ĉiuj prelegoj estas parolitaj en Esperanto.

Ekster la fakkunsidoj ni partoprenis la komunajn kunsidojn de Revelo.

La kolegoj de la direkcia regiono Essen intencas kunveni en la kadro de la subsekcio ĉiujn duan monaton kiel en la pasintaj monatoj.

La 15an de oktobro komenciĝis kurso por komencantoj en Essen. La kurson, kiun gvidas nia kolego Waldmann (Recklinghausen), partoprenas 10 geinteresuloj.

Kelkaj kolegoj de la direkcia regiono Essen ĉeestis la renkonton de GEFA en Fulda la 12an kaj 13an de oktobro. Schnetzer

Frankfurt. Jam delonge nia grupo festas ĉiujare karnavalan vesperon. Kantoj, ludoj kaj dancado ĝojigis la ĉeestintojn, vere gaja rondo kune kun la samideanoj de la urba grupo.

En Wiesbaden ni aranĝis varbekspozicion kaj pretigis novan subgrupon. Radio-intervjuo pri la ekspozicio kaj pri la celo de la lingvo inter la fervojistoj estis bona varb sukceso.

Ĉirkaŭ dek membroj de nia grupo partoprenis la IFEF-kongreson. En aŭgusto vizitis sudfranca IFEF-samideano nian urbon. Ni

gastigis lin kaj montris al nia amiko la vindindaĵojn de la urbo kaj de la ĉirkaŭaĵo. Lang

Karlsruhe. Ĉirkaŭ fine de januaro 1957 estis prezentita al mi la tasko de subsekciestro en la direkcia distrikto Karlsruhe. Sekve de malsano kaj forpermeso fariĝis julio, ĝis kiam mi povis transpreni sur min la taskon. Faris malfacilaĵojn, eltrovi la fervojistajn esperantistojn en la distrikto kaj kontakti kun ili. Varbletero en septembro al la oficialaj lokoj de BSW Karlsruhe ne sukcesis verŝajne pro tio, ke ili ne publikis mian leteron.

14 esperantistoj apartenas al IFEF dume pliaj 8 ankoraŭ volas atendi, ĉar ili ne scias sufiĉe bone Esperanton. La kunveno en Fulda partoprenis el nia distrikto 8 personoj parte kun familianoj. La 14an de oktobro ni ricevis la permeso de la oficejo en Heidelberg, uzi la tlean instruĉamboron por la grupvesperoj. Kursoj por komencantoj nuntempe okazas en Schwetzingen (4 partoprenantoj) kaj en Heidelberg (8 partop.). Diskuto kun la sekciestro por kulturaj aferoj estis sukcesa. Interalie estis transdonita biblioteko el 23 libroj, kiu estos disponebla al la membroj komence de januaro 58. Ĝis nun okazas kunvenoj en Heidelberg, Mannheim kaj Karlsruhe, kiujn partoprenis ankaŭ eksterlandaj samideanoj nefervojistaj. Fine de oktobro okazis en Schwetzingen Esperanto-Kunsido de Sogelo, al kiu partoprenis ankaŭ niaj fervojistaj esperantistoj. En Karlsruhe estis meze de decembro plensukcesa Zamenhoffesto, kiun ĉeestis ankaŭ la distrikto. Ĝis nun en ĉi-tiu jaro okulfrapa progreso ne povis esti registrata kaj la nombro de membroj pligrandiĝis malgrave. Ni esperas, ke pliaj sukcesoj povos esti atingataj 1958. Winkelhaus

Regensburg. En nia direkciegionoj ĝis antaŭ nelonge ekzistis nur 3 lokaj grupoj de GEFA, nome: Passau, Plattling kaj Weiden/Opf. Nur en ĉi-tiu jaro oni sukcesis fondi ankaŭ en la sidejo de la direkcio mem, do en Regensburg, malgrandan esperantistan rondon. S-ano Eckmeier, Ga Regensburg Hbf, estas nia grupestro kaj f-ino Kammerer funkcias kiel sekretarino. Krome apartenas al nia grupo ges-anoj Langer kaj 3 aliaj personoj, kiuj nur malofte vizitas la grupvesperon. La nomataj personoj jam iam finis kurson sen instruisto, memlernante nur laŭ la lernolibro de Wingen. Ni sukcesis varbi ankoraŭ 4 kolegojn kaj antaŭ 3 monatoj ni denove malfermis kurson. Jus ni pritraktis la kvaran lecionon. Se ĉio fariĝos bona, je la fino de la kurso ni povos anigi al nia movado novajn adeptojn. Kvankam mi mem ne havas instrukapablecon, mi pro manko de iu instruisto arogis gvidi la kurson. Krom la taskoj en la unuopaj lecionoj mi ellaboris aldonajn taskojn hejmlacionajn kaj korektas la laborojn faritajn. Tiu servo estas por ĉiuj granda avantaĝo kontraŭe al aŭtodidakta metodo. La gekursanoj estas entuziasmaj kaj ĝojus, se ili eble povus partopreni UEA-kongreson en Mainz aŭ minimume nian 2an en Nürnberg. Do ankaŭ en Regensburg nia movado ekfloris eĉ nur malrapide, sed tamen ĝi kreskas. Nun ni bezonas helpon kaj ni tre ĝojus, se iu unuopulo aŭ grupo interkontaktus kun ni. Ni kunvenas ĉiujade je la 17a—19a horo en la apudĉamboro de la Ga-kantino Regensburg. Redlich

Redakcio: Paul Steinig, Bremen, Ausbesserungswerk. Deĵoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen, Bussa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribmaŝino unu kaj duonliniajn al la redakcio, tradukaĵojn kun la originala teksto. Sendlimo por manuskriptoj 1. I., III., V., VII., IX., XI.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn